
STARTO ★

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1976 2(54)



KOMUNIKO PRI LA 8a KONSULTIGO EN POLLANDO

En la tagoj de la 2-a ĝis 4-a de aprilo 1976 okazis en Krakovo la oka laŭvica Konsultigo de reprezentantoj de la Esperanto-asocioj kaj movadoj en Bulgario, ĈSR, GDR, Hungario, Pollando, SSR, USSR.

La konsultigo traktis problemojn de la teoria kaj praktika agado de la esperantistaro en la reprezentitaj landoj. Estis ellaborita vico de rekomendoj al la koncernaj LA por pritraktado kaj realigado.

Specialan atenton oni turnis al la Sepa Ĝenerala konferenco de la MEM /Mondpaca Esperantista Movado/ en proksima julio en Ruse, Bulgario, kaj al la plibonigo de la redaktado kaj eldonado de ties revuo "PACO" utiligante por tiu ĉi celo la dokumentojn de la Konferenco en Helsinkio /1975/ kaj la proponojn ellaboritajn de la 25-a kongreso de Komunista partio de USSR, kiel ankaŭ la venontjaran Tutmondan Pakkongreson en Varsovio.

Oni pridiskutis vicon da taskojn ankaŭ en la sfero de la praktika kunlaboro de la koncernaj LA.

En la tagordo estis ankaŭ la temo pri la parlamenta kaj regiona agadoj en la socialismaj landoj lige kun la programo pri similaj agadoj de la UEA.

Estis traktitaj iuj sciencaj kaj teoriaj problemoj kiel ekzemple tiuj pri ellaboro de fundamentaj sciencaj materialoj rilate la staton kaj evoluon de la problemoj de Internacia Lingvo, kunlaboron kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda lingvoproblemo /CED/ k.s. Oni prenis decidojn pri la preparo de la venontjara Nova konsultigo. La estraro de Pola Esperanto Asocio aranĝis amikan akcepton por la partoprenintoj de la Konsultigo.

I I .

La konsultigon partoprenis ankaŭ reprezentantoj - gvidantoj de la junularaj sekcioj de la koncernaj LA, kiuj pritraktis komunajn kaj specialajn problemojn de la junulara esperantista movado en la socialismaj landoj. La reprezentantoj informigis reciproke pri la organiza strukturo kaj atingoj en siaj landoj por trovi pli konvenan bazon por kunordigi la estontan agadon. Oni esprimis deziron kaj pretecon plifirmigi la kontaktojn inter la junaj esperantistoj celante la pli vastan amikecan kunlaboron inter la junularo de la socialismaj landoj por komunaj celoj. Elirante el la fakto, ke la konsultigo de la junularo estis tre fruktodona, ĉiuj reprezentantoj de la junularaj sekcioj de la socialismaj landoj interkonsentis, ke valoras kaj necesas daŭri la partoprenon de la junularo en sekvontaj laŭvica konsultigoj.

Ĉiuj esperantistaj kaj aliaj informorganoj estas petataj: Ribikiĝu parte aŭ entute tiun ĉi komunikon!

Krakovo, 5.4.1976

el konsultiĝa salono ►



★ ALTA REKORDO AL EK OPAVA ★

RONDETA VIVO

Dum la lasta konferenco de Uzina-Klubo Ostroj, Opava, estis transdonita al Esperanto - rondeta diplomono, per kiu Centra Sindikata Konsilantaro / ŬRO/ aprezas la kulturpolitikan agadon kaj elstarajn rezultojn en ŝatokupa art-agado honore al la 30a datraveno de liberigo de Ĉeĥoslovakio. La diplomon suskribis sekretario de ŬRO B. Kaĉirek. Esperanto estas menciita en la rezolucio de la konferenco kiel rimedo por konatigi la eksterlandajn kamaradojn kun la sukcesoj de la socialisma konstruado kaj pacdefenda batalo.

P R A H A

Omaĝe al la IIA kongreso de ĈEA aranĝis Eli Urbanová en februaro interesan ekspozicion pri Esperanto en muzika teatro Karlín, kiun spektis multnombraj vizitintoj el diversaj urboj de nia lando.

La 16.3. komenciĝis regulaj mardaj kunvenoj de EKP en la restoracio "S K A L K A", Praha 10, Strašnice. Autobuso 128.195, tramo 4, 10, 24, Poŝtaĵojn destinitajn por la klubo oni bv. sendadi al la adreso de ĈEA.

U S T Í n. L.

Pri "Komenio kaj internacia lingvo" prelegis en la Pedagogia fakultato doc. V. Novobilský CSc. La solkantisto de la operdomo en Ustí n. L. s-ano M. Smyčka prezentis kelkajn ariojn en E-o kaj du poemojn de Bezruč. Krom la prelego, kiun partoprenis 30 studentojn kaj ekspozicio de beletraj tradukoj en Esperanto kaj en la ĉeĥa pere de Esperanto estis sufiĉa da demandoj flanke de studentoj.

Z N O J M O

IG de ĈEA, EK Znojmo aranĝis "Vesperon de Esperanto" kun ekspozicio de bildkartoj omaĝe al 59-a datraveno de la morto D-ro L. Zamenhof. Partoprenis 22 geesperantistoj, recipe gejunuloj.

Bildkartoj de ZNOJMO kun Esperanta teksto por 0,90 Kčs haveblaj l Mendu ĉe EK při Měst. OB, nám. Miru č.22, ZNOJMO.

ĈESKE BUDĚJOVICE

Inter la martaj prelegoj de la grupo estas menciindaj tiuj pri la katernacia virino tago/O. Hrubý/ kaj pri J. A. Komenský/ inĝ. I. Maroušková/. La 15an de marto okazis ĵarkunveno omaĝe al la 50a datraveno de la klubo.

FRYĎEK - MĪSTEK

Prelegis pri Komenio okaze de la Tago de instruistoj A. Milatová en la kafejo ESPERANTO. la 21an de marto, akompanante la prelegon per koloraj diapositivoj.

O S T R A V A

Helsinki kaj paco estis la temo de la prelego, kiun faris A. Staĥura la 15an de februaro. La preleginto gvidas kurson por komencantoj. L. Klegová informis la rondetanojn detale pri la II-a kongreso de ĈEA. La junularo en Ostrava intencas entrepreni 14tagan peraviadilcan ekskurson al Sovetio kaj en Ivanovo viziti la ĝemelan rondeton.

Inter★



klub

KOMISE PRO ĈLENOST MLÁDEŽE ĈES se ve své letošní činnosti soustředí na osvětlení praxi mládežnických se-minářů, které jsou nejen prospěšné z hlediska rozšiřování myšlenek mezinárodního jazyka, ale také stimuluji mládežnický kolektiv. V poslední době se podařilo prosadit myšlenku putovních seminářů - v této oblasti dochází k intenzivní spolupráci se slovenskými mládežníky.

Cílem připravovaného semináře ve dnech 7.-9. května v Lančově je mládežnická pomoc letnímu táboru. Vyjádřením spolupráce Komise se sází MEM na účast gen. taj. MEMs KOOVÁRY na tomto semináři.

Z PLÁNŮ KOMISÍ ČES

METODICKO-PROPAGAČNÍ KOMISE vyvíjí svou činnost jednak v oblasti metodiky práce s členy, především v místních skupinách, jednak v oblasti propagace myšlenky a praktické aplikace mezinárodního jazyka esperanta.

V oblasti metodiky je úkolem komise působit soustavně na zvyšování úrovně činnosti místních skupin. Cílem je zvýšit jazykovou a teoretickou úroveň členstva, podchylovat začátečníky, vést pokročilá a orientovat členy na profesionální i zájmové využívání znalostí jazyka.

V oblasti propagace je úkolem komise široké působení na veřejnost a její představitelé a cílem vytvářet kladný postoj k problematice mezinárodního jazyka a k jejímu konkrétnímu řešení-esperantu.

Plán činnosti komise na rok 1976 předvidá zejména sezónění členstva s rámcovou činností, vyhodnocení zkušeností místních skupin v oblasti metodiky práce s členy, udržování kontaktu s masovými sdělovacími prostředky a publikování vhodných materiálů /článků, zpráv, relací, šotů ap. /, založení archivu informačních tiskovin a jiných dokumentů.

/zh/

TURISTICKÁ KOMISE na své schůzi v Brně 6.3.1976 konstatovala, že v zájmu zlepšení činnosti bude nutno navázat spolupráci se všemi skupinami ČES zejména v těchto oblastech:

1. V zájmu koordinace větších zájezdů, zejména do zahraničí, včas získávat informace o akcích místních skupin, Komise ochotně pomůže jejich pořadatelům tím, že

a/ pomůže doplnit potřebný počet účastníků,

b/ podle možnosti poskytne informace k trase zájezdu,

c/ zapůjčí prospekty, průvodce, mapy a pod.

2. Pro potřeby vydavatelů turistických prospektů v esp. a jejich zapůjčování pořadatelům zájezdů komise zakládá archiv turistické literatury.

3. Komise rovněž hodlá soustřeďovat a soustavně aktualizovat informace pro pořadatele zájezdů po ČSSR a do zahraničí. Půjde zejména o a/ adresy výhodných ubytoven s uvedením počtu lůžek, volných termínů ap.

b/ možnosti zapůjčení zájezdových autobusů za režijsní cenu od klubů a podniků,

c/ údaje o schopných turistických průvodcích se znalostí esperanta.

4. Komise je také ochotna pomáhat skupinám při návštěvách zahraničních esperantistů, kteří chtějí poznat ČSSR a nabízí zejména:

4. Komise je také ochotna pomáhat skupinám při návštěvách zahraničních esperantistů, kteří chtějí poznat ČSSR a nabízí zejména:

a/ poskytování turistických informací hostům /i předem/

b/ přípravu zájezdů po ČSSR dle přání hostů

c/ pořadatelům předá zkušenosti z akcí podobného druhu.

Informace, tiskoviny a nabídky ke spolupráci zasílejte na adresu: Libor Kříž v á n e k, Zbořovská 1332, 397 01 Písek / tel. do zam. 2404, do bytu 3423/.

Poznámka: Komise připravuje v r. 1977 hlavně zájezd do NDR / asi na 9 dnů / a na rok 1978 kromadný zájezd na 63. světový esp. kongres do bulharské Varny.

/lk/

SETKÁNÍ ABSOLVENTŮ PÍSEMNĚHO KURSU ESPERANTA se uskuteční ve dnech 11.-13. června v Poděbradech. V programu je zahrnuto pracovní jednání o písemném kursu, výměna zkušeností, informace o esp. hnutí, slavnostní koncert věnovaný tvorbě esp. překladatele J. Kořínka a exkurse na Oseček. Účastnický poplatek činí 30.- Kčs /studující a uční 15.- Kčs/. Teprve po jeho uhrazení považují pořadatelé přihlášku za závaznou. Příhlašku zašlete na adresu: Pavel Polnic k ý, Polabecnovostavba, 290 01 Poděbrady.

LA UNUA PARTO DE LA 15-A REGULO

Eksterdube la dua parto de la 15-a regulo estas la ĉefa, ĝloai- la parto de la regulo. Sed tio tute ne signifas, ke la unua parto de la regulo ne validas. Ja ne ĉiam etimologia transprenado estas ebla. Pluraj latinaj kaj same ankau grekaj esprimoj, kiuj estas prototipoj de niaj tiel nomataj vortoj fremdaj, apertis la plej zigzagan evoluon. Dum sia pli ol dumiljara historio ili devis subiĝi al abundaj aliigoj kaj modifoj ne formas, sed sencaj tiel, ke ilia hodiaŭa signifo tute ne estas simple nur la logika sumo de la unuopaj elementoj, el kiuj ili konsistas. La uzo, la praktiko donis al ili nuancojn, kiuj iel ne rezultas el la prototipo, el la bazo, kaj kiuj ofte havas nenion komunan kun la iama origina senco. Okazis io simila, kio okazas pri arĥeologiaĵoj. La fundamentojn kovris sablo de la forgeso. Sed sen la kono de la fundamentoj tute ne estas kompreneblaj la fragmentoj, kiuj elstaras supre.

Tiel, ekzemple, la esperantaj premi, presi, esprimi, eksprese, ekspresionismo ja devenas de unu sola latina premo, ere, pressi, pressum /respektive ex-primo, ere, pressi, pressum/. Malgraŭ tio oni ne povis apliki ĉi tie la 2-an parton de la 15-a regulo, ĉar la latina prototipo alprenis dume tiom da diversaj sencoj kaj signifoj, ke sen-erara kompreno ne estus plu ebla. Pluraj lingvoj/la ĉeĥa, germane ktp./ ja ne distingas inter premi kaj presi, cetere sen la ajn domago. Sed inter elpremi kaj esprimi disas tlia senca abismo, ke aparta vorto estis neceseĝa. Kaj ĉe la moderna ekspreso jam nur malproksima etimologio ankoraŭ iom rememorigas pri la latina expressus. Kontraŭe ekspresionismo ŝajnas esti superflua francaĵo, ĉar Esperanto povas diri la saman, kaj eĉ pli koncize kaj pli komprenebla, per esprimismo.

Alia ekzemplo: invado. Ankau ĝi ne estas simple nur enveturo. Tamen ĉie, kie la aktuala signifo kaj la logika senco ne tro diskur- ras, oni obeu la 2-an parton de la regulo kaj antaŭeniru laŭ deriv- principoj de Esperanto. Sed ni lasu la latinan kaj ni turnu nin al la greka! La profana telefono, laŭvorte telesono, malproksimsono apenau eldiras la ideon, kiun donis al ĝi la praktiko: malproksim- parolilo, teleparolilo / germane Fernsprecher /. Telefono do estas tipa reprezentanto de la unua parto de la 15-a regulo. Sed ankau la indigenaj teleparoli, teleparolo, teleparolilo, televokilo ne estas superfluaĵ, kiel montras hazarda konversado: "Kie estas telefono?" li demandis, "Mi bezonas televoki Vienon!". Aliflanke teleparoli, televoki, telebabili estas eĉ pruvo pri tio, ke Esperanto donas liberan spacon al libera kreado. Kaj ĝi estas nerekte klarigo pri tio, kial Esperanto altiras ĝuste intelektulojn: la reguleco de Esperanto in- time respondas al la esence tekna kaj geometria maniero de la moder- na pensado.

Sed ĝuste tial oni estu tre sobraj kaj singardaj koncerne la 1-an parton de la 15-a regulo. Kiel ni ĵus vidis, ekzistas ja latin- devenaj, respektive grekdevenaj esprimoj, ĉe kiuj la distanco inter la origina latina kaj nuna aktuala sencoj de la vorto tiom grandas, ke fakte temas pri du tute malsamaj nocioj. Krome ĉe pluraj grek- devenaj sciencaj vortoj la situacio estas ankoraŭ pli malsimpla. Tiel ekzemple telefon tute ne estas klasika greka vorto, sed lasence "barbara" artefarajo. Kaj tiaj estas eĉ multaj aliaj sciencaj ter- minoj "grekaj", kiuj ofte renversas ne nur la klasikan grekan vort-

faradon, sed ne rare eĉ surkapigas la tutan semantikon. Ni komprenos tion, se ni scias, ke tiujn vortojn kreas homoj, kiuj ja estas unu-arangaj fakuloj pri fiziko kaj tekniko, sed kiuj estas tre malmulte informitaj pri lingvistiko, kaj ankorau pli malmulte aŭ nenion pri la greka lingvo. Teknisto rajtas projekti sciencajn terminojn. Tamen la definitivan formon povas donadi al ili nur lingvisto. Ascepto estas alasebla, sed sole tie, kie teknisto estas samtempe ankaŭ filologo /kombino, kiu tamen ne estas tro kutima en la praktiko !/.

Tiu ĉi postulo aspektas eble iom burokrate kaj rigore. Ĝi devas aspekti tiel ! Ĉar ankorau ĉiam ni ne ellernis pensi autentente esperante. Ĝis nun ni ne sukcesis forskui ĉiujn nacilingvajjn emojn kaj misgustojn, kiuj nin igas vidi diferencojn tie, kie neniam diferencoj videblas. Tro ofte la "distanco" inter la autentaj kaj naturalismaj formoj estas pli malpli nula. Tro ofte tiu distanco fakte ekzistas nur en la mensoj de iuj okcidentaj parolantoj, al kiuj ŝajnas ke televido kaj televido estas du diferencaj aferoj. Efektive televido kaj televido estas precize la samo ! La malan ŝajnon kaŭzas nur la denaska nacilingva kutimo, ab 2/ kiu oni ne sukcesis liberigi. Tio, cetere, validas ankaŭ pri aliaj naturalismaj kreaĵoj. Novismoj kiel televido do neutile pezigas, longigas kaj malelastigas la lingvon, kaj tiamaniere obstaklas kaj bremsas la senĝenan fluon kaj viglan ritmon de la idiomato.

Sed naturalismaj formoj en Esperanto ĉiam kaj ĉie falas eĉ en sencesaĵn konfliktojn kun la aglutinaj spirito, konstruo kaj strukturo de la lingvo. PIV registras prefikson /fakte prepozicion/ pre, kiu havas la saman signifon kiel antau. Sed tiam, tute regule, oni povas formi pre-sidi, pre-sidanto same kiel antau-sidanto, kiuj kaj sence kaj konstrue respondas al la ĉeĥa pred-sedati, pred-seda, al la germana vor-sitzen, Vor-sitzer, al la latina prae-sideo, prae-sidens kaj aliaj, kiuj tiel certagrade arkaigas la oficialajn, sed naturalismajn Zamenhofajn prezidi, prezidanto.

Anstataŭ stabiligi la lingvon, PIV do malstabiligas ĝin. Sed ankaŭ tio devis veni. Ĉar nur tio estas historia kaj normala. La saman funkcion cetere havis kaj plenumis eĉ la unuaj ĉeĥaj vortaroj el la epoko de la nacia renaskigo. Plena Vortaro estis progresema. PIV estas regresema. Sed iel ĝuste tio estas progreso: evolua kaj dialektika.

La "naturalisma revolucio" tiel alportos unu gravan rezultaton. Ĝi kondukos al ankorau pli granda skemigo kaj integriĝo de Esperanto !

Sed la unua parto de la 15-a regulo estas eĉ iasenca aŭtomata certigilo, ia malantaŭa pordeto, speco de sekreta elirejo, alarmbremsoso.

Zamenhof sciig, ke en ĉiu sistemo ekzistas neperfektaĵoj, nesolvitaj kaj neantaŭvideblaj detaloj, kiuj obeeas neniam leĝojn kaj neniamajn regularojn, sed kiujn tamen, pro praktikaj kaŭzoj, estas necese almenaŭ iel sistemigi kaj klasigi. Jen kial la 15-regulo ! Sed jen, ankaŭ kial la 15-a regulo devas resti pli malpli escepta regulo kaj kial ĝi ne povas iĝi rimedo de ia senbrida, masa kaj amasa novigado kaj imitado.

Tiusence la 15-a regulo fakte estas nur ia antaŭcambro, atendejo de la lingvo. Tra ĝi novaj elementoj alfluas. Sed antau ol akcepti ili devas trairi necesan novicadon. Tie la lingvo provas kaj ekzamenas, tornas kaj tordas ilin. Tie okazas la natura selekto, t.e. la negantumita kaj sencereonia kribrado kaj verigado per la vivpraktiko. Iam tiu verigado estas nur momenta. Aliam, kontraŭe, ĝi daŭras jarojn, eĉ jardekojn /kiel eĉ trista aŭ preventi/. Tiel ke mi apenau povas jeĵuri pri iu au alia formo. Ĉar vortoj, kiuj ŝajnis firmaj, neŝancelablaj kaj stabilaj dum du au tri dekaĵoj, subite disfalas kiel subfositaj muroj. Preventi fariĝas jen pre-veni kaj pre-

skripto reduktiĝas al pre-skripto kaj poste eĉ al pre-skribo. Vole nevole jam la unua parto de la 15-a regulo do muldas ĉiujn novismojn tiel, ke fine ili tamen respondu al la postuloj de la dua parto. Kio, aliflanke, montras, ke la naturalismaj tendencoj, trudataj el ekstere, estas profunde fremdaj al la autentika spirito de la lingvo, en kiu ili tiel reprezentas elementon nehomogenan, malsamecan, nekoheran, nekunestantan, tute malpropran kaj fakte absurdan.

La "antaŭcambio" de la 15-a regulo do estas kvazaŭ ia karantena stacio, speco de kontraŭinfekta tenejo, en kiu oni esploras kaj desinfektas ĉion, kio volus eniri en la lingvon: imunologia centro.

Ĉar, kiel montras la ekzemplo de telefono kaj pre-sidanto, pri fremdaj vortoj, eĉ pri la plej internaciaj el ili, neniam estas certe, ĉu iam la lingvo ne anstataŭigos ilin per autentaj, indiĝenaj terminoj, ĉerpitaj el la propraj esperantaj fontoj kaj provizoj.

Fine la 15-a regulo, kaj precipe ĝia unua parto, estas eĉ grava esprimo de la Zamenhofa spirito. Volapük ankaŭ ne havis libegan evoluon. La lingvo, en kiu ĉio dependis de la bontrovo de ĝia aŭtoro, ne bezonis la 15-an regulon, ja ĝi eĉ ne povis havi ĝin! Alia lingvo, en kiu ĉio dependis de la vivo kaj de la libera evoluo, kreis al si la 15-an regulon mem. La 15-an regulon Zamenhof ne elfantaziis, li tiris ĝin rekte el la realo, el la sperto, el la naturo. La 15-a regulo estas do nenio alia ol konciza leciono, preskaŭ elmonstro de tio, kiel kaj kiamaniere kreskas, riĉiĝas kaj evoluas la naciaj lingvoj. Sed dum en la naciaj lingvoj ĉio ĉi okazas iel automate, preskaŭ hazarde, pli malpli senkonscie kaj sendepende, tieldire nature, en Esperanto ĝi okazas surbaze de la 15-a regulo, kvankam ambaŭkaze okazas esence la samo. Ĉar ambaŭkaze temas pri la samaj fenomenoj kaj aferoj. La 15-a regulo estas la plej alta konfirmo de la interna, ena skemeco de Esperanto, konfirmo de ĝiaj unuarangaj kaj unikaj kvalitoj sociologiaj!

Motoj:

- 1/ La latina lingvo, almenaŭ la klasika, estas relative vortmalriĉa. Ĝi kompensas tion per la konata multsignifeco de sia esprimaro.
- 2/ ab - for de, disde, malal; mi iris al li je tria, sed jam je la kvara mi revenis ab li.

Ni evoluigu Esperanton AL PLIA PRECIZECO

En antaŭlasta numero de Starto en tre konvinka kaj frata apologio demonstras akademiisto Karolo Piĉ superecojn de Esperanto kompare kun t.n. naturalismaj planlingvoj Occidental /Interlingue/ kaj Interlingua. Similsenca artikolo de eminenta soveta sciencisto kaj lingvisto prof. M. I. Isajev aperis antaŭ nelonge en la altnivela gazeto Hungara Vivo. Inter la nepravaj avantaĝojn de Esperanto apartenas krom ĝia socia ekfunkcio, ĝia "popolo" de lingvouzantoj sur ĉiuj praktikaj kampoj, ne mallaste ĝia struktura memstareco, perfekta reguleco kaj optimuma senecepteco.

Eĉ se ni en la menciitaj reguleco kaj senecepteco ne alstrebas ĝisekstreman absolutecon, restos tamen pripensindaj kaj pliprefektendaj kelkaj tro ĝenaj kazoj de dusenceco, ja eĉ kontraŭsenceco.

Dum la Akademio de Esperanto solvis la malunuecon kaj diskutojn pri la senco de pasivaj participoj en senco de Zamenhof ĝzo, kaj eblon donis al la pasiva participo emfazi la finitecon au daŭron de okazado, resp. emfazi la rezulton de ago kaj tiel esprimi fajnnuance la aspektojn de verbo kiel tion kapablas precipe la slavaj lingvoj, restis iuj aliaj solvendaj ĝis nun netusitaj. Pri du temoj tiuj ĉi linioj.

Ĉe la celata ideala maksimuma precizeco de nia planlingvo la

unusenceco semantika kompreneble ne estas ĝenata de metaforaj krom-senceoj de vortoj, kiajn postulas la artisma lingvo, la poezio kaj kiajn havas ĉiuj lingvoj. Ankaŭ la sinonimoj ĉe multuzataj vortoj de la komuniza lingvo ne estas balasto, sed vere ridigo de la lingvo, kiel ekz. malbela, aĉa, malplaca, turpa; malproksima, fora, lontana, dista; rapidegi, hasti; mallonga, kurta; malmola, dura; malforta, febla ktp. Komprenebla la senprefiksaj sinonimoj / jam dum 45 jaroj uzataj do vere na plu neologismoj/ ne signifas kondamnon al la valorega prefikso mal-! Male, licu uzado de prefikso mal ankaŭ ĉe tiaj vortoj, se oni volas estigi iom malkutiman, penshaltigan novecon aŭ krei freŝan rimon. Do oni darfu uzi "malkonciza, malkurta, malhasti, malĉe"tiacele. Ĝenaj estas sinonimoj ĉe fakaj terminoj, ekz. boaco, rangifero, norda cervo; kleo, klefo; kobajo, kavio ktp. Tiaj balastoj por la vortaroj estiĝis parte pro la nedisciplineco de aŭtoroj aŭ nehavigebla de koncernaj terminaroj aŭ fakvortaroj.

Sed precizecon de lingvo atencas hononimoj, kiuj iam eĉ en kunteksto kaŭzas dusencaĵojn, eĉ miskomprenojn. Tiujn planlingvo devas elgarki kaj oni prave enkondukis apud rodo - rongon, devizo - devison maco - matcon, kirko - cirkuon ks. Ĉi tien ne apartenas hononimoj ĉeajnaj, ekestantaj per afiksoj /kataro, boletto, sentema./ Similaj ekzistas senĝene ankaŭ en etnaj lingvoj, ili en kunteksto apenaŭ iam kaŭzas miskomprenon, male, allasas plurajn vortulojn el la stoko de R. Schwartz.

Mi volas ĉi tie nun observi du vortojn, al kiuj la signifojn, ja eĉ tute malajn. La unua estas la verbo d e v i, nome ĝia negatitiva formo. Se "mi devas" signifas mi havas devon, signifas logike "mi ne devas" mi ne havas devon, analogie kiel mi ne povas/ mi ne havas povon, mi ne volas/ mi ne havas volon, mi ne emas/ mi ne havas emon ktp. Do se mi diras "mi ne devas tion fari" signifas logike: mi ne havas devon tion fari, sed mi rajtas tion fari, se mi volas, neniu malpermesas tion al mi. Sed samtempe ĝi povas signifi, ke mi tion devas ne fari, ke mi do havas malpermesitecon tion fari, ke mi havas devon ne fari tion pro ies malpermeso nedependa de mia volo aŭ emoj. Kia kontraŭsenceco kontrabandita en nian planlingvon el la etnaj lingvoj: oni ne devas kaj oni samtempe devas! Tiu ĉi kontraŭsencaĵo estas sankcanta per ekzemploj en la Plena Vortaro: Pri gustoĵ oni disputi ne devas /oni devas ne disputi/; oni ne devas havi tro da konfido al si mem, mi ne devas malatenti tion", /devas ne malatenti tion /; kaj sekvas pluraj tiaj ekzemploj. Similajn uzojn oni ne malofte poste trovas ankaŭ en nia literaturo. Se oni ne volas uzi alian trafan verbon, dum jardekoj sufiĉe vaste uzatan kaj envicigitan en multaj vortaroj, ekz. ĉiuj ĉeajnaj -Esperantaj kaj Esperanta-ĉeajnaj, kaj ĉiuj slovakaj-Esperantaj, kaj Esperantaj-slovakaj, spite ĝin ignoris la PIV kaj la PIV, nome la verbon d a r f i, oni povas uzi la verbon devi kaj la negativatecon postmeti, ekz.: oni devas ne havi tro da konfido al si mem, aŭ oni devas havi ne tro da konfidig al si mem. Kelkfoje taŭgas la verbo "rajti" por eviti tian kontraŭlogikaĵon, sed pli bone la malpermesitecon eksplicite esprimas la plej frata verbo darfi. Tiam signifas: mi ne devas tion fari hodiaŭ = mi ne havas devon tion fari hodiaŭ /sed mi povas tion fari libervole, neniu malpermesas, neniu malhelpas min/=Analogie signifas: Mi ne devas ĉi tie fumi=mi ne havas devon ĉi tie fumi/ sed mi povas/ Mi devas ĉi tie ne fumi/ -mi ne darfis ĉi tie fumi =/ne licas, ke mi ĉi tie fumu =/estas al mi malpermesite ĉi tie fumi/= Mi ne rajtas ĉi tie fumi=/mi ne havas rajton ĉi tie fumi/ pro ia morala sindevigo aŭ kvazabulega malpermeso. Komparu: ĉiu homo rajtas esprimi sian opinion, sed tamen ne ĉiulande darfis.

Estus dezirinde, ke ni celu al tia unusenca precizigo ĉe la formo "ne devi" kaj la mallogika uzo fariĝu arkaismo. La verbo darfi estas plej konvena evitigilo kontraŭ malĝusta uzo. Mi legis ies obje-

ton, ke oni ne povis siatepe decidiĝi inter darfi kaj durfi. Sed tĉi estis delonge decidita per vasta uzado de darfi. Ankaŭ aserto, ke lici /laŭ licenco/ sufiĉas tiucele, ne estas plentaŭga solvo, ĉar lici, kiun la menciitaj vortaroj listas, ne estas uzata kun esprimita subjekto /pronomo ks./ Do same kiel apud "blas, ke vi foriru" samsignifu "vi povas foriri", signififu apud "licas, ke vi foriru" "vi darfis foriri".

La dua ĉi tie tuŝata vorto estas la prepozicio t r a n s. Ĝi signifas laŭ la PV: prop. montranta lokon kuantan pli malproksime ol la objekto, kiu estas komplemento de tiu prepozicio: 1/ sen lokŝanĝo: la popoloj loĝantaj trans la maro. Antaŭ la malleĝigo de la sono oni devas esti trans la maro; auskulti trans la muro. /Kie !/ Sed samtempe: pensoj iras trans la limo sen pago kaj timo /kien !/ Hanibalo iri trans la Alpoj /kien !/ Ĵetu pilkon trans la muron /kie- n !/ La hirundo flugis trans la riveron /Kien !/ Veturi trans la maron /kien !/. Konfuzo, ĉu ? Kion do signififu: Oni vidis homojn prome- nadi trans la limo... Ĉu ili promenadis transe de la limo aŭ trans la limon /transpaŝante ĝin/ ? Estus do same grave rezervi por trans kun nominativo lokmontron sen lokŝanĝo /kie ?/, kaj por trans kun ali- zativo lokŝanĝon, transpono de io. En dubaj kazoj pri la lokŝanĝo estus korekte: la ŝnuro pendis tra la korto, la knabino saltadis trans la svingsnuron. Ĉe konsekvenca uzado estus tiam korektaj: pen- soj iras trans la limon sen pago kaj timo. Hanibalo iris trans la Alpojn. Tia uzo estas ankaŭ la plej konforma al la nuna kutigo. La pli fruaj mallogikaj uzoj estu listebiaj aŭ kiel arkaismaj aŭ kiel simplaj eraroj.

Moderna tempo, epoko de scienc-teknika revolucio, de cibemsti- ko kaj kosmonautiko postulas ankaŭ de planlingvo, kaj precipe de ĉi, optimuman precizecon kaj konstantan kaosevitajn precizigadon.

Jiří Kořínek



SET ATENDAS VIN

Ankaŭ en tiu ĉi jaro la loka grupo de ĈEA en Třebíč organizas la tradician esperantistan aranĝon - la 24an Someran Esperanto-Tenda- ron en Lančov. Ĝi okazos en du etapoj:

1. inter la 18.7. - 31.7.1976 kaj
1.8. - 14.8.1976

Ĉiutage antaŭtagmeze okazos instruado en kvin diversgradaj kursoj, nome: A /por komencantoj/, B /progresintoj/, C /konversacia/, D/ por tradukantoj/. Posttagmeze okazos banado, sportado, ekskursoj, vespe- re tendarfajroj ks. La loĝado plejparte diope en tendoj. La tendara- no devas sin submeti al la fina ekzameno kaj observi la tendaran re- gularon. Oni invitas ankaŭ eksterlandajn esperantistojn kun b o n a s c i p o v o de E-o.

La tendarkotizo, kiu inkluzivas kvin manĝoj potage estas 600.-Kĉs. La tri ekskursoj /unu tuttaga, du duontagaj, por 60-80 Kĉs/ ne estas enkalkulitaj en la kotizo.

*

EN SLOVAKIO oni preparas i.a. Printempan esperantistan ren- kontiĝon en Alta Tatra-montaro /23.-25.4./, Turisman semajnon en Slo- vaka Paradizo /21.-27.8./ kaj amikan renkontiĝon en Dudince /3.9. - 5.9.1976/.

*

LA I-a ESPERANTO-FERIADO EN GDR okazos en bone ekipita inter- nacia kampadejo apud Berlino, en lagoriĉa kaj arbarplena regiono, inter la 5a ĝis la 18a de septembro 1976. Estas antaŭviditaj la tri- gradaj lingvaj kursoj. Interesitoj sin anoncu ĉe Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, 108 Berlin, Charlottenstr.60 ĝis la 1-a de julio. La nombro de alveturantoj kun propraj tendoj ne estas limigita.

Evidence PŘELOŽENÉ A PŮVODNÍ LITERATURY v Esperantu

/Výzva ke spolupráci/

Díky iniciativě zesnulého dr. T. Pumpra existuje základ kartotéky překladů českých autorů do esperanta; poslední záznamy však byly provedeny téměř před čtvrtstoletím. Obracím se tudíž na všechny esperantisty, kteří mají zájem na doplnování kartotéky a kteří mají možnost provádět výpisy, o nichž se dočtou dále, aby se přihlásili u autora tohoto článku ke spolupráci. Kartotéční listky jsou řazeny abecedně podle jmen autorů originálů. V nejbližší době začne přepis listků na děrované karty, které v budoucnu umožní rychlé třídění dat podle nejrůznějších hledisek.

Své budoucí spolupracovníky prosím, aby ve své práci postupovali takto:

1. Zvolte si pramen, z něhož budete provádět výpisy /časopisy, knihy a pod. a korespondenčním listkem mne p ř e d z a p o č e t í m p r á e e o něm informujte.
2. Zvolený pramen pečlivě prohlédněte a vypište:
a/ překlady českých a slovenských autorů do esperanta / pokyny k výpisům jsou uvedeny níže /
b/ originální práce českých a slovenských esperantistů v esperantu.
Výpisy se týkají jak krásné, tak i o d b o r n é l i t e - r a t u r y .
3. Údaje vypište strojem /jen zcela ve výjimečných případech rukou, a to hulkovým písmem/ na listky kancelářského papíru o rozměrech 125 x 75 mm.
4. Dodržujte tuto zásadu: na jednom listku p o u z e j e d n o l i t e r á r n í d í l o /týká se ovšem i jednotlivých básní/; pokud došlo k více vydáním téhož díla, vyznačte je na témž listku.
5. Neprovádějte výpisy p ř e k l a d ů /netýká se originálů/ z časopisů a knih /viz oddíl III/, neboť ty byly již v minulosti excerptovány.
6. Oznamte i prameny, ve kterých jste nenalezli žádný materiál.

I. POKYNY K PROVÁDĚNÍ VÝPISŮ PŘELOŽENÝCH PRACÍ ČESKÝCH A SLOVENSKÝCH AUTORŮ DO ESPERANTA

Listek bude obsahovat tyto údaje:

a/ úplné jméno českého nebo slovenského autora /bez zkratek/, b/ název literárního díla v národním jazyku, včetně podtitulu / vyznačte, o jaký útvar jde /román, povídka, básně apod./, c/ název díla v esperantu, d/ úplné jméno překladatele /uvést event.zkratky, příp.pseudonym/, e/ forma publikace:

1. samostatná - uvést nakladatele, redakci, rok a zemi vydání, počet stran, formu vazby, cenu v nár.měně, rozměr /v mm/, kde je dílo dostupné
2. nesamostatná - /časopisy, sborníky apod./ - uvést úplný název pramene, zemi a rok vydání, redakci, ročník, číslo sešitu, stranu, stránkový rozsah, kde je publikace dostupná

U bodu 1/ i 2/ vyznačit příp. vysílání díla v rozhlasu nebo televizi, uvedení díla na jevišti apod. Přitom uvést datum a zemi uvedení, obsazení a další důležité údaje.

f/u dosud nepublikovaných překladů uvést, kde je rukopis uložen, g/jméno osoby, která provedla výpis, h/nepostačuje-li k výpisu jeden listek, připojte další stejných rozměrů.

II. POKYNY K VYPISŮM ORIGINALNÍCH PRACÍ ČESKÝCH A SLOVENSKÝCH AUTORŮ

Lístek bude obsahovat tyto údaje:

a/ úplné jméno autora /příp. pseudonym/, b/ název literárního díla v esperantu /vynadit o jaký literární útvar jde, např. básně, povídka/, c/ forma publikace: 1. samostatná - podle bodu I-e
2. nesamostatná - podle bodu I-e
d/ v případě dosud nepublikovaných prací: uvést, kde je uložen rukopis, e/ jako I-g, f/ jako I-h
V případě, že rukopisům překladů nebo originálních prací hrozí nebezpečí zničení, upozorněte autora tohoto článku, aby mohly být učiněny kroky k jejich zachování a archivování pro budoucnost.

III. PŘEHLED ČASOPISŮ A KNIH, KTERÉ JIŽ BYLY EXCERPOVÁNY A JEJICHŽ

VYPISY JSOU JIŽ OBSAŽENY V KARTOTÉCE

/Pozn.: z těchto pramenů byly excerpovány pouze p ř e k l a d y.
Originální práce obsažené v těchto pramenech, excerpovány nebyly, a čekají na své zpracování. Letopočty znamenají v č e t n ě.

Časopisy: Esperanto /UEA, Ženeva/: 1905-1931, Revuo Internacia /Bystřice p. Hostýnem/: 1902-1903, Časopis čs. esperantistů /Praha/: 1907-1914, Bohema esperantista-český esperantista /Praha/: 1908-11, Lingvo Internacia /Paříž/: 1906-XI-1908-XIII a 1910-XV-1914-XIX, La Kulturo /Praha/: 1912-14, Juna Esperantisto /Paříž/: 1911-IX-1913-XI, La Progreso /Plzeň, pak Praha/: 1918-I-1932-XV, Esperantský zpravodaj /Praha/: 1923-III, Germana Esperantisto /Berlín/: 1921-22, Espero Teozofia /Paříž, Praha/: 1921-II-1929-X, Literatura Mondo /Budapešť/: první období 1923-II-1926-V, druhé období: 1931-I-1938-VIII, Oomoto Internacia /Paříž, Kameoka/: 1926-1935, Oomoto /Ajabe, Kameoka/: 1930-32, Ligilo /Prostějov/: 1930-39.

Knihy: Fr. V. Lorenz.: Úplná učebnice mezinárodní řeči Dr. Esp. / 1890 / , Kühnel : Methoda Kühnelova. Úplná učebnice Esperanta / 1909 / , Vymazal : Mezinárodní řeč Esp. pro samouky / vyd. I. a II. / , Čejka-Krumpholz : Esp. a jazyk mezinárodní, Žďárský - Procházka : Učebnice Esperanta / 1923 / , J. Bednář : Esp. ve 100 hodinách / 1925 / , dr. A. Šilha : Učebnice pomocné mezinárodní řeči / 1926 / , J. Šupichová : Esp. kurs v čas. Malý čtenář / 1911-18 / , Esp. kurs v čas. Rozkvět / 1916-18 / , Malá učebnice Esperanta / 1924 / , Legu kaj parolu / 1925 / .

Podle skrovného výčtu excerpovaných časopisů a knih je vidět, že zbyvá velmi mnoho materiálů k systematickému zpracování. Proto uvítám všechny, kteří se podle uvedeného návodu zapojí do této činnosti. Zvláště se obracím na naše činné překladatele a autory originálních prací, aby svými informacemi přispěli k doplnění kartotéky. O postupu práce budu esperantskou veřejnost informovat na stránkách Starta.

RNDr. Vlastimil Novobilský, CSc.

Školní 5


400 01 Ů s t í n a d L a b e m

TE NEPŘEHLEDNĚTE NEPŘEHLEDNĚTE NEPŘEHLEDNĚTE NEPŘEHLEDNĚTE NEPŘEHLEDNĚTE

SEKRETARIÁT ČES upozorňuje čtenáře, že si mohou opět, po delší době objednat KAPEŠNÍ ATLAS v esperantu za Kčs 20,-. Objednávky zasílejte na adresu svazu.

ROVNĚŽ VÁM NABÍZÍME nové druhy samolepek použitelné na kufr, dveře poštovní schránky, do aut a pod. Samolepka je třibarevná/červená, modrá, zelená/ na bílém podkladě s textem ESPERANTO PAROLATA.

NI LEGIS



Fr.R.Kreutzwald:KA L E V I P O E G.
Estona popola eposo /Fragmento/ /
Trad. Hilda Drezen.Eld.Besti Raamat,
Tallinn, 1975.

La estona nacia eposo kalevipoeg-kontraus al la eposoj de aliaj nacioj - artkreita de estondevena kuracisto Fr.R.Kreutzwald kun helpo de lia amiko Fr.R.Faehlmann. Ambau deziris per la kreo de nacia eposo sugesti kaj vekti estonan nacian memkonscion de la nacio, kiu ekde la XIII-a jarcento suferis sub la premo de fremdnaciaj grandbienuloj venintaj el Germanio.

Tial oni komencis en la unua duono de la XIXa jarcento, sub la gvido de Faehlmann, kolekti la estonan folkloron: fabelojn, kantojn, popolajn rakontojn pri la estona mitologia heroo Kalevipoeg, kiujn post la morto de Faehlmann kunligis, literature finpretigia kaj versformigis Fr.R.Kreutzwald. La eposo, kiu en sia fina formo enhavas 19 052 versojn, farigis mejloŝtono en la kreo de la estona literaturo. Per sia alegoria formo la eposo simbolis gloran nacian estintecon kaj estontecon kaj entuziasmigis la estonojn ankoraŭ en la lasta milito en ilia batalo kontraŭ la faŝistoj.

Por ĉeĥaj esperantistoj estas ĝoje konstanti, ke la unua ĉeĥa traduko el Kalevipoeg estis farita de elstara ĉeĥa esperantista literaturisto M.Lukáš. La esperantan tradukon brile faris la mondkonata Hilda Drezen kaj redaktis ĝin - inter la ĉs. esperantistoj bone konata - Henrik Seppik. La traduko de aliteraciaj versoj estas rava kaj Esperanto sonoras, brugs kaj skuas en ili kiel la maro: "Ondo sin post ondo rulas, / kvazaŭ ludu sin luladas, / sin al borda roko batas, / ŝaŭmon spruce disŝutadas". La libron, ilustritan per koloraj bildoj de Oskar Kallis, eldonis Besti Raamat en Tallinn en eleganta grafika formo; cetero ĝi jam eldonis aliajn esperantajn tradukojn el la estona literaturo /Promet: Kruŝanta tigro, Krusten: Okupacio/. La libron nepre devas posedi ĉiu amanto de bona literaturo.

Havebla ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, Praha 1, por 6.-Kĉs. Havebla estas ankaŭ: Krusten, Okupacio, por 8.-Kĉs.

PhDr. J.Jermák CSC

SEĜFOJE EN ĈESKÁ TŘEBOVÁ

Pli ol 300 geesperantistoj kaj amikoj de E-o partoprenis la VII-an Esperanto-balon fine de januaro en Česká Třebová, ofere me aranĝitan de la loka Esperanto-rondeto "Amikeco". La salono de Kulturdomo estis ornamita per grandaj turismaj afiŝoj el diversaj landoj kaj flagetoj de pluraj amikoj-korespondantoj. La balon enkondukis la prezidanto de ER P. Batěk, kiu bonvenigis gastojn el diversaj el urboj de Ĉeĥoslovakio. Sub la gvido de M. Voleská la rondeta kankoro prezentis la komponaĵon de J. Slezák. Dum la noktmeza danpauzo estis lotumita rika tombolo; oni nur bedaŭris, ke eksterlandanoj mankis ĉi jare. La tutstata sindikata gazeto "Práce" alte takais la balon per artikolo, kiu mencias la eksterordinare bonkoren medion dum la balo, finante per Esperantaj vortoj: "Venontjare ĝis la revido".

/jp/

SIGNIFA RAPORTO :

Ministerio de internaj aferoj ĈSR jesigis sensenĝe nian proponon de la asociaj statutoj, kiuj akceptis nia dua kongreso en Praha. Letere kun tiu ĉi informacio havas datumon 16.3.1976. Numero de la letere estas VS /1-2553/76.

korespondi deziras

Gelernantoj 11-14 jaroj. Kursgvidanto: Mózes Dániel H-2911, Mocsca, Hungario o *Geczár Sándor, H-6100 Kiskunfélegyháza PF 31, Hungario o Odincov Dima, Jalta, Litkenska 7, kv. 6, SSSR 334200 o E. Möller, 34j. laboristo, DDR-27, Schwerin, Mövenburgstr. 49 o Grupo de gekuracistoj el Sumen /R. Kasabova, Kiril i Metodij 84/, Bulgario o M. Karajanev, Sofia 1618, kompl. Bakston bl. 20, vh. B o T. Kochnowicz, 55-221, H.M.R. 28/321, Pollando o Czeslaw Bassara, ul. Dworcowa 138, 43-211 Piasek, Pollando o Varga Ibalya 18j. f-ino 4251 Hajdúszámon Vörös Hadsereg ut. 25 Hungario o Kónya Erzsébet, 3300 Eger, Rózsa Károly u. 14. IV/21/22j. studentino/ o Esti Olv 22j. f-ino, USSR 20 2020 Estonio, Kohtla-Järve 3, Sakala 18 o 39jara ĵurnalistino kaj 36 jara juristo kun du korespondemaj esperantistinoj el CSSR /Slavko Šimunčić, p.f. 4039, YU-41110 Zagreb, Jugoslavio o Pavel Konvalinka 17j. Polaká 97. 777 00 Olomouc, CSSR. Pri elektrotekniko, lingvistiko o Urge serĉata "El popolo Cinio 1964/3, 1966/4-6, 1967/4-6, 1969/9, 1974/10, 1975/6. Skribu al dro Jaromír Jermář, Jablonová 43, 106 00 Praha 10.

KRONIKO

La 20-an de julio ĝisvivas sian 75-jaron s-ino Božena F r e m - l o v á, esperantistino ekde 1949 tre aktiva komitatano de EK Znojmo.

Forpasis en Brno la 12.2. Josef P o l á ĉ e k , aĝa 74 jarojn kaj la 6.3. en Praha Ludmila W i k o - v á , aĝa 69j.

En Pardubice forpasis la 4-an de apr. Jan V a ĉ e ě , aĝa 78 j. En Teplice forpasis la 15.2. Alois K o š t á l , prez. de LG, aĝa 68 j.

La 1-an de marto mortis en Opava ing. Leopold F i r l e y an

la aĝo de 41 jaroj, li plurfoje disponigis sian kant-arton al kulturprogramoj de Esp. kunvenoj. Honoron al ilia memoro !

Mirolava R y b á ĉ k o v á kaj Oldřich K o s n a r geedziĝis en Pardubice la 26an de marto. Nian gratulon !

DARY NA FOND ČES : Nejmenovaný dárcce, Dubí u Teplic - 2000.-Kčs, M. Štěpánková, Poděbrady -25.-Kčs, R. Kopecká, Kladno - 10.-Kčs, A. Mikšik - 18.-Kčs, J. Kavka, Pernátejn - 20.-Kčs, manželé Mullerová - vi, Šumperk - 100.-Kčs a manželé Štarmenovi -30.-Kčs. Srdečný dík !

LA ESPERANTLINGVA PROSPEKTO "La muzeo de militoperacio ĉe Ostrava" estas nakorau havebla ĉe EK, p.k. 8, 746 01 Opava, CSSR.

ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ se bude podílet věcnou cenou za nejlepší esperantickou sbírku na mezinárodní výstavě poštovních známek PĽR CSSR "Ostrava 76", která se uskuteční ve dnech 4.-19.9.1976.

SKRIBU NACILINGVA al Vatikana Radio /Radio Vaticana, Città del Vaticano/ esprimante vian ĝojon pri la enkoduko de la duonoktaj programoj, en kiuj oni aplikas i.a. ankaŭ Esperanton. Ev. mencii, ke vi eksciis pri la programo pere de la esp. elsendoj de Radio Roma.

LA SOVETIA ESPERANTO - JUNULARO organizas ekspoziciojn kaj prelegojn dediĉe al la XIV-a Kongreso de KPASU kaj petas ĉiujn esprimi sian vidpunkton pri tiu ĉi evento. Kromas estas petataj artikoloj el la nacilingva gazetaro ks. materialoj kun event. resumo en E-o, kiujn oni voste profitos en la propagando de E-o. Respondu al membroj de Klubo de internacia amikeco en Tichvin, USSR.

FILIO DE PEA en Košalin organizas la ĉebaltan esperantistan printempon en Mielno /16- 20 .5. 1976/. Logado en komforta moderna ripozloko. Lingvoperfekta kurso.

DOKTOROJ, ĜEFLEBISTOJ - UNUVORTE LA MEDICINISTOJ/SED EC PLUJAJ INTERE - SANTOJ/ MENDU MEDICINISTAJN INFORMOJ TUJ ĈE NIA ASOCIO. PETU SENPAGAN PRUVNUMERON !!!!!

Memento Stockholmu

V ohnisku mírové ofenzívy socialistických zemí v čele se Sovětským svazem je i nadále úkol, jehož řešení je v zájmu celého lidstva: omezit a snížit početní stav strategických zbraní, růst vojenských výdajů, dosáhnout úplného odzbrojení. Naléhavost tohoto úkolu připomněl nedávný XXV. sjezd KSSS.

Proti dalšímu horečnému zbrojení vyzvala loni Světová rada míru. Obrací se na všechny parlamenty, společenská hnutí a organizace, aby spojily své síly v nové kampani proti hromadění zbraní. Dokument SRM navazuje na historickou stockholmskou výzvu, která se před 26 lety rozletěla ze švédského hlavního města k národům celého světa. Podepsalo ji tehdy více než 500 miliónů lidí, z toho téměř deset miliónů obyvatel Československa. Byl to první významný úspěch ještě mladého hnutí obránců míru.

Na tíživé břemeno zbrojení upozorňují suchá a neuprosná fakta: podle výzkumů expertů OSN by snížení vojenských výdajů o pouhých 20 procent stačilo na vyřešení neodkladných hospodářských problémů rozvojových zemí. Jen za malou část prostředků, které vydaly státy NATO v roce 1973/asi 140 miliard dolarů !/by se mohly postavit tři miliony bytů nebo 50 tisíc mateřských škol. Náklady na stavbu jedné letadlové lodi by mohly zajistit roční výživu pro 400 tisíc lidí. Nelze ani zdaleka uvést všechny možnosti, které by mohly přispět k blahu celé společnosti, kdyby se podařilo prosadit sovětské návrhy týkající se postupného odzbrojení. /kni/

LETERO AL PARLAMENTANO

Pri la "turmentoj de la multlingveco, pri la granda malŝparo de intelektoj kaj materialaj fortoj sekve de ĝi kaj pri la ebla solvoj de ĉi tiu problemoj" informas la membrojn de la Hungara parlamento la reprezentantoj de Hungara E-Asocio en sia letero publikigita en Esperanto Ma-

gazin /1975/10/kaj represita en Hungara Vivo n-ro 1/1976. Finante la leteron oni skribas: Sennombraj signoj avizas, ke alvenis la tempo, kiam oni devas esplori la demandon sur la plej altaj forumoj de la unuopaj landoj kaj federacioj. Por la skribo de nia letero nin kuragigis, ke laŭ nia opinio, la sociaj rezultoj kaj politika - kultura atmosfero de nia patrio, krome la internacie rekonitaj sukcesoj de la Hungarlanda Esperanto-movado estas eble la plej konvena kadro por tio, ke ĝuste la hungaraj parlamentanoj faru nun la necesan paŝon - en interkonsento kun la socialismaj kaj aliaj progresemaj landoj - por metigi la demandon sur la tagordon en UN.

SALUTO EL TASKENTO

Okaze de la 28a datreveno de la Venka Februaro kore kaj frate bondeziris pere de Starto ĉiujn popolojn de CSSR Petro Poliščuk, prezidanto de la Esperanto-komisiono kaj estrarano de Uzbeka Amikeca Asocio. Li skribas en sia letero i.a.: Ni devas flegi kaj firmigi nian fratan amikecon kaj tion ni vere celas kaj efektiviĝas.

Okaze de la Internacia tago de virinoj sendis varman saluton al ĉs. esperantistinoj Bulgara MEM-komitato kaj la Virina Komisiono de BEA. Klaipeda Esperanto-Klubo kaj la membroj de Pola Esperanto-Asocio el la norda landparto salutis ĈEA okaze de la Semajno de Internacia Amikeco. Korajn salutojn el Trenčín sendis partoprenintoj de la tiea kunsido de Okcidentoslovakia Regiona Komitato de AE SSR /la 20.2.1976/.

SENKULPIGO. En la lasta n-ro ni erare notis aperon de Panoramo 1/1976 kiu devis enhavi fragmentojn el la Slovaka Antologio k.a. Tiu ĉi aperos en Paco 1976 kaj la venonta Panoramo prezentos la tradukan kaj originalan version de J. Kofínek.

Same ni pardonpetas V. Brožík, kies nomo mankas en la listo de la komitatanoj de ĈEA.

MEM-peranto

MEM PARTOPRENIS LA MONDKONGRESON EN BERLINO. Kiel ni eksciis el GDR la reprezentantoj de MEM partoprenis en la traktadoj de la Tutmonda kongreso en la Internacia Jaro de Virino en Berlino /20-24. 10. 1975/. La delegitinoj H.Sauerbrey kaj I.Schodl aktivis en la 5a kaj 9a komisionoj de la kongreso kaj tie skizis la laboron de MEM, speciale akcentante la solidarecon de MEM kun Vjetnamio kaj la kunagadon kun la Tutmonda Paĉkonsilio. La du delegitinoj transdonis al la kongresa komitato mesaĝon de la MEM-prezidanto N. Aleksiev. Plurokaze ili atentigis pri la lingva problemo, kiu grave malhelpas la komunan strebado de la virinoj. Tiu ĉi problemo akre sentiĝis ankaŭ dum la kongreso : en la plenkunsido oni tradukis en kaj el 20 lingvoj, la ĉiutagaj bultenoj aperis en la angla, franca, rusa, germana, hispana kaj araba.

LA ESTRARO DE ĈEĤA PAĉKONSILIO en sia letero de la 23a de februaro komunikas al la Sekcio konsenton pri la formoj de plua reciproka kunlaboro, precipe sur la eldonkampoj kaj sugastas, ke la reprezentantoj de ĈES estos regule invitataj al gravaj agadoj de ĈP, krome ili plu funkcios en koncernaj fakaj komisionoj.

En "Zpravodaj ĈMR", n-ro 2/1976 aperis rekomenda artikolo por distriktaj paĉkonsilioj, ke ili intensigu siajn kontaktojn kun la MEM-movado. La sekliaj aktivoj nepre profitu ĝin.

ĈS,SEKCIO DE MEM /federacia/ pretigis interkonsenton pri daŭra kunlaboro kun Ĉs.Paĉkomitato en Praha, precipe rilate la eldonan aktivecon kaj aplikon de E-o en la internaciaj kontaktoj de la Ĉs. paĉmovado. La komitato aperigos libroforme en 1976 selekton de leteroj de M. Kuderíková, la ĉeĥa patriotino ekzekutita de nazioj.

PERMA PARTO ELDONOTA. Laŭ la informoj el Bratislava la ĉefan dokumenton de la konferenco en Helsinko baldaŭ eldonos en Esperanto Slovaka Paĉkonsilio. La tradukon faris P.Rosa.

INICIATIVA MÍROVÝCH BRIGÁD K XV.SJEZDU KSĜ

II. plenární zasedání ĈMR dne 25.10.75 se zabývalo dalším rozvojem hnutí mírových brigád v průmyslu, zemědělství a současně vyhodnotilo nejlepší z mírových kolektivů za jejich aktivní podíl a závazky na počest 30. výročí osvobození ĈSSR. Odezvou na společné zasedání ÚV NF ĈSSR, ĈSR a SSR 19.2.1976 byly další závazky mírových kolektivů. Např. mírový výbor VTŽ Chomutov s BSP "Bojovníci za mír" BSP "Obránců míru" se rozhodly na počest XV.sjezdu odpracovat 8 hodin na pracích v patronátní škole, 8 hodin zdarma ve svém závodě a 8 hodin na úpravách "růžového sadu" v Lidicích.

/Laborokolektivoj kun paca nomo honore al la XV-a kongreso de KPĈ/.

DOPORUČUJEME našim čtenářům, aby si objednali časopis Mír, na jehož stránkách vychází také pravidelná rubrika Z mírové sekce ĈES !

STARTO : Eldonas Ĉeĥa esperanto asocio, Jilská 10, Praha 1.Telefono P-ge 220 262. Respond.redaktoro Oldřich K n í c h a l ,red.rondo : ing. Sviták, J. Mařík, Dr.J. Jermáček.S.Dohl. pošta Mělník.Povolené rozhodnutím StRS Praha ze dne 13.1.1976,pod.č.j.P/Kli-275/76. Tiskne"Romnožovna"KS Neratovice. Předáno tiskárně dne 21.4. 1976.

PRO MAMINKU
ÚSPORA ČASU
PRO DĚTÁTKO

ZDRAVÁ VÝŽIVA



VLASTA

instantní krupičková kaše

K VÁŘÍ SE

PŘÍMO V TALÍŘI SE SMÍCHÁ
S TEPLOU MLÉKEM
A JE HOTOVA K JÍDLU



VLASTA - INSTAR

estas grieta kaĉo, kiun vi ne kaŭras.
En la telero sole intermiksi ĝin kun
la varma lakto. Kaĉo poste jam estas
preparata por manĝi.

Informojn sendos al vi ka reeĥon de
legantoj atendas

VITANA n.p. B Y Š I C E ,okr.Mělník